

IPI

Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 113 (4/2020) ◆ 29-a jaro (tria serio) ◆ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://www.facebook.com/esperantic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Bonvenon 3

Novaĵoj 4

CED reorganiziĝas sub nova estraro	4
Kio estas CED?	5
Jarfina raporto de Esperantic Studies Foundation	6
“ESF Aktuale” de Grant Goodall	6
Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA	6
PIV 2020	6
Premio Grabowski 2020 al Bertilo Wennergren	7
Interreta biblioteko	8
Radaro	8
TeachLing	8
Premio Joshua A. Fishman	8
Planet Word	9

Venontaj eventoj 10

55-a Kunveno kaj Konferenco de ALTE	10
30-a GIL-konferenco	10
56-a Lingvistika Kolokvo	14
Modernlingva Asocio: Glasgovo (Skotlando)	14
3-a Internacia Konferenco pri Tradukado, Interpretado kaj Kognado	14

Internacia Simpozio PaCor 2021	15
Kursoj de UNED nun ankaŭ je la nivelo B1	15
Raportoj 16	
Societo pri Historio kaj Epistemologio de Lingvoscienco	16
Sukcesa VEKIĝo de ILEI	16
5-a Interlingvistika Simpozio en Poznano	17
Libroj 19	
Kontestataj lingvoj: La kaŝita plurlingvismo de Eŭropo	19
De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko	19
Gvidilo al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj	20
Internacia Kongresa Universitato 2020	20
At the Waters of Oblivion	21
Lingvoinventado en lingvosciencia pedagogio	21
Lingvomastruma aliro al lingvaj problemoj: integri makro- kaj mikro-dimensiojn	22
Aliaj eldonaĵoj 23	
Esperanto: La vivanta, ŝanĝiĝanta, planlingva komunumo: Fono kaj eltiraĵoj laŭ esperantista perspektivo	23
Pandemio-temaj artikoloj en <i>Multilingua</i>	23
Trans-kom	23
Cahiers du Centre de linguistique et des sciences du langage	24
Oficiala rekono de minoritataj lingvoj kaj lingva justeco: indikilo fondita sur bonfart-ekonomiko	24
Esperanto por lingva justeco kaj egaleco	25
Efemereco kaj Tunela Esperanto: studo pri plurlingvismo, laboro kaj rilatevoluigo en tunelbora projekto	25
Language Problems and Language Planning	25
Studoj pri Mondaj Lingvaj Problemoj	26
Pri la aspekto de Esperanto laŭ la vidpunkto de iuj lingvistoj: diversaj neveraj asertoj pri Esperanto kaj ĝia lingvokomunumo	26
La misfamigo de Esperanto kaj la erara glorigo de la angla	26
La slavaj fontoj de Esperanto	26
Resumo de italaj disertacioj pri Esperanto	26
Esperanto kaj sociaj sciencoj	27
Ludwig Zamenhof, la inventinto de Esperanto	27
Maro estas gutaro. Historio de la Esperanto-movado en Katalunio	27
Stipendioj de ESF 28	

BONVENON

Ĉi-numere ni aldonis al nia kovropaga nomplato la adresojn de du novaj retejoj de Esperantic Studies Foundation:

- ◆ La paĝaro esfacademic.org temas speciale pri kunlaboro en akademia esplorado. Tie oni jam starigis “universitatan reton” por interkontaktiĝi kaj interkonsiliĝi, inkluzive interesan galerion de filmetoj, en kiuj universitatoj klarigas, kiel rolas Esperanto aŭ rilataj temoj en sia laboro. Troviĝas ankaŭ paĝo (<http://esfacademic.org/eo/eldonaĵoj/>) kun detaloj pri (kaj ligiloj al) tiakampaj revuoj.
- ◆ La nova blogo esfconnected.org informas pri la laboro, servoj, atingoj, ktp de ESF, kiel publika vizaĝo de la fonduso al la klera ekstera mondo. Artikoloj estos verkitaj de la estraro, subtenatoj, la konsilantaro, organizantoj de simpozioj, kaj apartaj invititoj. La blogo nun funkcias; bonvolu aboni, legi la afiŝojn kaj lasi komentojn!

Kvazaŭ por ekvilibri la pesilon, ni inkluzivas ĉi-numere ankaŭ informojn pri la historio, celoj kaj agado de CED (Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj), kiu lastatempe reorganizis sin sub sia nova direktoro Mark Fettes. Pri la nova strukturo vi povas tuj legi en la venonta paĝo.

Ni daŭre esperas, ke ĉiuj legantoj bonfartas malgraŭ la efikoj de la pandemio. Egale, ni daŭre bonvenigas anoncojn kaj raportojn por venontaj informiloj. Bonvolu sendi tiajn kontribuojn al Angela Tellier ĉe ipi@esperantic.org. La limdato por *IfI* 114 estas la fina tago de 2020.

Simon Davies
(redaktoro)

CED reorganizigas sub nova estraro

<https://uea.org/asocio/CED>

Mark Fettes

En aŭgusto 2020 Humphrey Tonkin, la Direktoro de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj) dum pli ol kvar jardekoj, transdonis sian gvidan postenon al Mark Fettes. Kunlaborantoj jam de multaj jaroj, la du universitataj profesoroj kaj eksprezidantoj de UEA (Universala Esperanto-Asocio) interkonsentis pri la elprovo de nova organiza formo por tiu plej longdaŭra esplora centro de la Esperanto-movado.

CED nun konsistas el Konsilantaro, kiun nomumas la Estraro de UEA. En ĉi tiu momento, tiu Konsilantaro konsistas el jenaj homoj: Xavi Alcalde, Irene Caligaris, Renato Corsetti, Mark Fettes, Guilherme Moreira Fians, Michele Gazzola, Federico Gobbo, Kimura Goro, Alessandra Madella, Mélanie Maradan, A Giridhar RAO, Orlando E Raola, Ida Stria, Angela Tellier, Humphrey Tonkin kaj Bernhard Tuidier.

El inter la anoj de la Konsilantaro, Fettes kunmetis malgrandan estraron kun respondeco pri kvin ĉefaj agadkampoj, jene:

1. **Esperantologio kaj interlingvistiko** – Guilherme Moreira Fians (Esperantologiaj Konferencoj, revuo *Esperantologio*)
2. **Lingvopolitiko**, precipe en internacia/interŝtata kadro – Michele Gazzola (*Language Problems and Language Planning*, Nitobe-simpozioj)
3. **Universitataj studprogramoj** (pri Esperanto kaj rilataj temoj) – Angela Tellier (precipe kunordigo de projektoj por subteni/disvastigi tiajn programojn)
4. **Bibliotekoj** – Orlando Raola (unuavice Biblioteko Hodler; krome kunlaboro inter Esperanto-bibliotekoj ĝenerale)
5. **Terminologio** – vaka (rilatoj de UEA kun TermNet, Infoterm; terminologia trejnado)

Informilo por Interlingvistoj estas komuna bulteno pri ĉiuj tiuj kampoj. Nuntempe ĝin redaktas Simon Davies kaj Angela Tellier kun subteno de ESF (Esperantic Studies Foundation). La tiel nomata CED-Fonduso, same subtenata de ESF, donas modestajn subvenciojn por projektoj sur tiuj kampoj (unuavice kampo 1). Pri la rilatoj inter ESF kaj CED Fettes mem zorgos, estante samtempe estrarano de ESF; Raola, kiel ano de la Estraro de UEA, zorgos pri ĝiaj rilatoj kun CED.

Kiel unua paŝo al la kreo de komuna laborplano, la estraro starigis la retliston ced-konsilantaro@groups.io, kaj invitis la anojn de la Konsilantaro al interkonsiliĝo pri la bezonoj kaj prioritatoj sur ĉiuj kvin kampoj. Observantoj, kiuj interesiĝas pri unu aŭ pluraj el la

agadkampoj de CED, estas bonvenaj aliĝi al la listo per mesaĝo al la adreso ced-konsilantaro+subscribe@groups.io.

Demandoj kaj esprimoj de interesiĝo pri la laboro de CED estas bonvenaj ĉe la Direktoro, Mark Fettes mfettes@sfu.ca.

Kio estas CED?

La Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kreiĝis en 1952, kadre de Universala Esperanto-Asocio, por antaŭenigi la sciencajn esploradojn pri Esperanto “kaj ĝiaj multflankaj aplikoj en ĉiuj sferoj de la vivo”; prizorgi la kolektadon kaj ellaboradon de fidindaj dokumentoj pri Esperanto; kaj subteni la informan laboron ĉe internaciaj organizaĵoj, fakaj kaj sciencaj rondoj, kaj la ĝenerala publiko.

La ĉefa motoro de CED en ĝia unua jardudeko estis Ivo Lapenna; de post 1974, la plej ŝlosilan rolon ludis Humphrey Tonkin. Inter ĝiaj kunlaborantoj troviĝas nomoj kiel William Auld, Detlev Blanke, Marjorie Boulton, William Collinson, Probal Dasgupta, Isaj Dratwer, Mark Fettes, Rudolf Haferkorn, Ulrich Lins, François Lo Jacomo, Gerrit Makkink, Paul Neergaard, Claude Piron, Juan Régulo Pérez, Ryszard Rokicki, Victor Sadler, Klaus Schubert, Gaston Waringhien kaj Richard Wood.

CED daŭre rolas centre en la intelekta vivo de la Esperanto-komunumo per diversaj agadoj, inkluzive:

- ◆ la revuon *Language Problems and Language Planning*
- ◆ ĉi tiun bultenon *Informilo por Interlingvistoj*
- ◆ la revuon *Esperantologio / Esperanto Studies*
- ◆ la trilingvan broŝurserion *Esperanto-Dokumentoj* (<https://uea.org/teko/ED>)
- ◆ la ĉiujaran Esperantologian Konferencon
- ◆ Konferencojn pri Lingvo kaj Komunikado (nun simpoziojn organizatajn de la Studogrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, sed ĉiam sub aŭspicio de CED: <https://www.languageandtheun.org/>)
- ◆ Bibliotekon Hector Hodler en Roterdamo (<https://uea.org/asocio/biblioteko>)
- ◆ kunlaboron kun aliaj organizoj kaj institucioj kiuj okupiĝas pri interlingvistiko, esperantologio kaj lingvopolitiko, interalie GIL (*Gesellschaft für Interlinguistik*: <http://www.interlinguistik-gil.de>) kaj ESF (Esperantic Studies Foundation), nordamerika fondaĵo kun tutmonda perspektivo (<https://www.esperantic.org/eo/hejmo/>).

ESF financas programon de malgrandaj subvencioj, administrata de CED, por subteni esploradojn, studadon kaj instruadon de temoj ene de la celoj de CED.

Por pli da informoj, vizitu <https://uea.org/asocio/CED> en la retejo de UEA.

Jarfina raporto de Esperantic Studies Foundation

<https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2020/08/Presidents-report-2019.pdf>

Legu pri la progresoj, atingoj kaj sukcesoj de ESF en la pasinta jaro en ĉi tiu elŝutebla raporto.

“ESF Aktuale” de Grant Goodall

<https://www.esperantic.org/>

Jen tute nova kaj mallonga filmeto, en kiu Grant Goodall, vicprezidanto de ESF, klarigas, kio estas Esperantic Studies Foundation kaj kion ĝi faras, skizante la prioritatojn kaj celojn de la fonduso.

Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA

<https://uea.org/gk/897a1>

En la unua kunsido de la Ĝenerala Kunveno 2020 de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio, kiu unuafoje en la historio okazis rete kiel parto de la Virtuala Kongreso de Esperanto, la Komitato elektis profesoron Humphrey Tonkin kiel Honoran Prezidanton de UEA.

Humphrey Tonkin, kiu naskiĝis en 1939 en Kornvalo (Britio), estis sendube tre influa kaj multflanka gvidanto de UEA. Prezidanto de la Asocio dum tri mandatoj (1974–77, 1977–80 kaj 1986–89), kaj Vicprezidanto aŭ Estrarano dum tri pliaj (1980–83, 1983–86 kaj 2001–04), li ankaŭ ekster la Estraro faris gravajn kontribuojn sur la kampoj de beletra, esploro kaj dokumentado, kaj eksteraj rilatoj.

Pli ol iu ajn alia, li estas ligita al la kreskanta tutmondiĝo de UEA en tiu periodo kaj al la plialtigo de la prestiĝo de Esperanto en la rondo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj sur la kampoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado. Rekone al la unika valoro, vasteco kaj daŭremo de lia agado kadre de UEA, la Estraro proponis elekti lin Honora Prezidanto – posteno, kiun li verdire jam okupas en la koroj de la membraro.

[Noto de la redaktoro: Humphrey Tonkin estas la prezidanto kaj kunfondinto de ESF.]

PIV 2020

<https://vortaro.net/>

<https://www.esperantic.org/eo/heimjmo/> (mallonga filmeto)

<https://www.youtube.com/watch?v=hDeOz5Mbqps> (La estonteco de PIV)

La nova eldono de la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, PIV 2020, estas finfine presita kaj mendebla. Ankaŭ ĝia interreta versio estas nun publike alirebla.

La nova serĉilo estas plene reprogramita de Bertilo Wennergren, la nova respondeculo pri PIV. Ĝi ofertas multe pli da ebloj ol la malnova ĉe vortaro.net. Ĉiuj novaj funkcioj estas detale prezentitaj en la sekcio “Klarigoj”.

Lastatempaj plibonigoj inkluzivas eblon serĉi morfologiajn vortoformojn kaj kapablon filtri vortojn laŭ siaj oficialeco kaj fako.

Premio Grabowski 2020 al Bertilo Wennergren

<https://uea.org/gk/907a1>

<https://bertilow.com/pmeg/>

<https://tekstaro.com/>

<https://www.youtube.com/watch?v=hDeOz5Mbqps> (La estonteco de PIV)

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912–2005). Ĝia regularo estis novformulita en 2017. La fondaĵo, portanta la nomon de “la patro de la Esperanta poezio” Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. La Juĝkomisiono de FAG, kiu de 1984 aljuĝas premiojn ĉiun duan aŭ trian jaron, nun konsistas el Jesper Lykke Jacobsen, István Ertl kaj Mariana Evlogieva. La administradon de la Fondaĵo prizorgas la Centra Oficejo de UEA.

La unua (kaj ĉi-jare sola) premio, je 800 usonaj dolaroj, iras al Bertilo Wennergren (Svedio/Germanio) pro liaj elstaraj kontribuoj al esperantologio.

Per sia *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG), kiu en sia reta eldono staras jam je la 15-a versio, li kreis novan referencon por priskriba esperanta gramatiko. Uzante novigan, simplan terminologion kaj abundajn ekzemplojn el kvalitaj fontoj, tiu verko klarigas al komencantoj kaj al specialistoj ĉiujn aspektojn de la Esperanto-gramatiko.

Wennergren krome kreis la retpaĝon *Tekstaro*, kiu ebligas la traserĉon kaj komparon de vasta literatura kaj gazetara tekstaro de pli ol 10 milionoj da vortoj. Temas pri grava ilo por la analizo de la efektiva lingvouzo kaj ĝia evoluo.

Akademiano de 2001, Wennergren deĵoris kiel direktoro de la sekcioj pri Gramatiko kaj pri la Ĝenerala Vortaro. En tiu lasta funkcio li iniciatis kaj subskribis la 9-an Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro en 2007.

Oni povas spekti prelegon pri “La estonteco de PIV”, kiun Bertilo prezentis en la ĉi-jara SAT-kongreso. Tie li iom demonstris la novan serĉilon, diskutis la enhavon de PIV 2020, kaj ankaŭ iom skizis la estontan evoluon de PIV.

[Noto de la redaktoro: La Tekstaron subtenas ESF.]

Interreta biblioteko

http://verkoj.com/php/plej_legataj.php

En Israelo aperis libere uzebla esperantlingva interreta biblioteko, kie esperantlingvaj verkoj senpage legeblas. La listo de la cent plej legataj verkoj troveblas ĉe la adreso tuj ĉi-supre.

Radaro

<https://www.radaro.org/>

La retkanalo *Radaro* atentigas freŝajn esperantistojn pri novaĵoj, eventoj kaj interesaj artikoloj el diversaj fontoj. Legantoj havas fenestron al la tre aktiva Esperanto-komunumo en Nord-Ameriko kaj la mondo. Titoloj estas en la angla, kun detaloj kaj pliaj informoj en la angla aŭ Esperanto. Unufoje semajne oni sendas retmesaĝon al abonantoj kaj afiŝas ĝin ĉe la plej popularaj sociaj komunikiloj uzataj de esperantistoj.

Por helpi nin altigi la kvaliton de *Radaro*, bonvulu sendi viajn ideojn por plibonigoj kaj fontojn por novaĵeroj, kiujn vi ŝatus vidi. Por aboni, retroŝtu al: chloe.everhart@radaro.org

TeachLing

<https://goo.gl/34wVVk>

TeachLing estas la plej granda retkomunumo por universitata lingvosciencia instruado en la mondo, kaj bonveniga kaj subtenema loko por diskutoj pri instruado en ĉia kampo de lingvistiko. Ĝi havas nuntempe 915 anojn el la tuta mondo, kaj bonvenigas de ĉiu ideojn, proponojn, demandojn, ligilojn, informfontojn, ktp.

Premio Joshua A. Fishman

<https://cloud.newsletter.degruyter.com/fishmanaward>

De Gruyter Mouton invitas memkandidatigojn por la Premio Joshua A. Fishman, kiu rekonas elstarajn neeldonitajn doktoriĝajn disertaciojn pri temo rilata al lingva sociologio.

La premion oni establis en 2018 per honori la intelektan kontribuon de Joshua A. Fishman al esplorado pri lingva sociologio, kampo, kiun li tiel grave formis tra multaj jardekoj. Per ĉi tiu premio, De Gruyter Mouton celas certigi, ke lia rikoltaĵo daŭre prosperu inter novaj kleruloj tiukampe.

Oni intencas, ke la premio subtenu universitatanojn en la fruaj stadioj de siaj karieroj. Sinproponojn taksos komitato de sendependaj juĝantoj. La fina akcepto por eldoniĝo estos sole laŭ la bontrovo de De Gruyter Mouton post kolega reviziado.

La premio konsistas el kontanta donaco de €1000 kaj librokupono je €100. Oni aljuĝos ĝis tri premiojn. Krome, premiitajn manuskriptojn oni rekomendos por eldono en la libroserio de De Gruyter Mouton *Contributions to the Sociology of Language* (CSL), kiun fondis Fishman kaj kiu publikigas gravajn esplorojn pri lingva sociologio dum pli ol 50 jaroj.

Limdato por sinproponoj: 15-a de januaro 2021.

Planet Word

<https://www.planetwordmuseum.org/>

Planet Word (Planedo Vorto) estas fascina prilingva vizitindaĵo en la historie grava Lernejo Franklin en Vaŝingtono (Usono). Ĝi estas la unua voĉaktivigita muzeo en la mondo, kaj ĝiaj interagaj galerioj kaj ekspozicioj vivigas vortojn kaj lingvon en distraj manieroj, kiuj allogas homojn de ĉia aĝo.

Ĝi malfermiĝis je la 22-a de oktobro 2020 per senpaga evento tuj elsendita.

La muzeo jam enhavas ekspozicion pri planlingvoj kun mencio de Esperanto. Ĝi estas malferma por vizitoj, realaj kaj virtualaj, fare de esperantistoj. Ĝia nomo vortludas pri *Planet World* (“Planedo Mondo”), ofta anglalingva priskribo de nia Tero. Laŭ la muzeo: “La fizika mondo estas samtempe unueca kaj diversa. Ĉu ne ankaŭ la lingva mondo estu tia?”

VENONTAJ EVENTOJ

55-a Kunveno kaj Konferenco de ALTE

<https://www.yee.org.tr/>
<https://www.alte.org/event-3576882>

Je la 2-a de novembro 2020 finiĝos la aliĝperiodo per ĉi tiu konferenco de Association of Language Testers in Europe, okazonta en Istanbul, Turkio de la 4-a ĝis la 6-a de novembro. La temo estas “Plurkulturismo: implikaĵoj por lingvo-lernado kaj -taksado”. La konferencon gastigos Yunus Emre Institute.

30-a GIL-konferenco

<http://www.interlinguistik-gil.de/>

La 30-a konferenco de la Societo pri Interlingvistiko (GIL: *Gesellschaft für Interlinguistik*) okazos de la 13-a ĝis la 15-a de novembro 2020 en virtuala formo. La temo estos “Interlingvistiko en analogaj kaj ciferecaj medioj” (*Interlinguistik in analogen und digitalen Medien*). La konferenca lingvo estos la germana. Okaze de la konferenco aperos la *Jarlibro de GIL 2020*. Jen resumo de la kontribuoj:

Věra Barandovská-Frank, “Kiel Occidental perdiĝis en internaciaj konfliktoj”

Planlingvoj estis konstruataj precipe kun la celo eviti internaciajn konfliktojn. Paradokse, ili mem suferis tiuokaze, plej multe dum la Dua Mondmilito: ekz. esperantistoj estis persekutataj kaj en Rusio, kaj en Germanio; planlingvaj organizaĵoj estis malpermesitaj (i.a. en Germanio 1935, en Italio 1939), tiel ke iliaj internaciaj kontaktoj rompiĝis. Ĉiuj planlingvaj movadoj estis malfortigitaj; kelkaj (kiel Academia pro Interlingua) ne travivis la militon. Ekzistis nur malmultaj esceptoj: IALA ellaboris siajn lingvo-versiojn en la jaroj 1939–1947 en Usono kaj Interimari Academie de Occidental travivis en la neŭtrala Svislando. La vivbatalo de Occidental, al kiu apartenis ankaŭ alinomigo al Interlingue (1949), estis tamen perdita post la milito, profite al la “usona” IALA-Interlingua.

Sabine Fiedler, “Pri lingvoŝanĝiĝo en Esperanto”

Lingvoj ŝanĝiĝas, ĉar la bezonoj de iliaj uzantoj ŝanĝiĝas. Tio veras ankaŭ por planlingvo kiel Esperanto, kiu povas retrorigardi al pli ol 130-jara historio de aplikado fare de aktiva lingvokomunumo. Tiu ĉi kontribuo prilumas kelkajn faktorojn, kiuj havas influon al la evoluo de Esperanto. Kelkaj el tiuj plifaciligas lingvoŝanĝiĝon kaj aliaj malhelpas ĝin. Ekzemploj estas prezentataj en la terenoj de fonologio, ortografio, morfologio, leksiko, semantiko,

frazeologio kaj gramatiko. Studoj pri tiu temo gravas, ĉar, unue, lingvoŝanĝiĝo estas ĝenerale konsiderata kriterio por la difino de vere uzata lingvo kaj ĉar, due, la evoluo de Esperanto estas ofte kontestata aŭ malĝuste prezentata.

Oscar Hughes, “Kiel kompleta estas la esperantista posedo de Esperanto kaj la angla, du riĉe evoluintaj lingvoj?”

Ĉi tiu artikolo esploras, kion implicas al parolproduktado la manko de vera medio por Esperanto kiel denaska lingvo. La aŭtoro konsideras la hipotezon, ke la vortoposedon de parolantoj influas la limigitaj kunteksto, en kiuj oni uzas Esperanton, kaj ekzamenas empiriajn datumojn arigitajn per traduktesto en Esperanton kaj la anglan, faritan de 12 partoprenantoj. Kvankam la datumoj ne subtenas la komencan hipotezon, ili ja hezite sugestas, ke la funkcioj atribuitaj al morfologia kaj derivaj strukturoj estas eble malpli strikte difinitaj en la parolantaro ol ĉe etnolingvoj. Tio sugestas, ke la komunuma alproprigo de ĉi tiu planlingvo ne kaŭzis, ke ĝia komence minimumeca gramatiko kaj semantiko kreskis por simili etnolingvon. Tamen, pro la limigita amplekso de la studo ne eblas eltiri firmajn konkludojn.

Claus J. Killing-Günkel, “Interlingua, Esperanto kaj matematiko”

Krom dividi planlingvojn en aŭtonomajn kaj naturecajn, ekzistas ankaŭ divido de planitaj kaj etnaj lingvoj en alofobiajn kaj alofiliajn. En matematiko kaj medicino, alofobia lingvo formas la specialan vortprovizon el propra vorttrezoro, dum Eŭropa alofilia lingvo kreas novajn teknikajn terminojn el la malnovgreka-latina. En tiu temo, la germana estas kaj alofobia kaj alofilia: *Eineindeutigkeit* kontraŭ *Bijektivität* kaj *Hirnhautentzündung* kontraŭ *Meningitis*. Dum Interlingvao origine estas alofilia, Esperanto estas esence alofobia kaj, pere de sia Regulo 15, ankaŭ alofilia. Male al Interlingvao, ĉi tiu konflikto kaj la subjektiva etoso de konstruema debato bonvenigata en Esperanto faras Esperanton nuntempe netaŭga por matematiko.

Bernd Krause, “Vidu la horon – Spegule: La Esperanto-horloĝo de 1908. Kun rimarkoj pri du aliaj horloĝoj kun rilatoj al Esperanto”

En aŭtuno de 1908 kelkaj usonaj gazetaj artikoloj raportis pri unika objekto, kiu staris sur la skribtablo de Henry D. King, unu el la elstaraj Esperantistoj en Usono. Ĝi estis “Esperanto-horloĝo”, kies montriloj iris en la kontraŭan direkton sur ciferplato kun spegultaj nombroj kaj la surskribo “vidu la horon – spegule”. La horloĝo estis amatora verko de Harry H. Pratley, alia grava amerika subtenanto de Esperanto, kaj ĝi baziĝis sur samepokaj *barbershop clocks* (“barbirejaj horloĝoj”), kiuj legeblas nur per aplikado de spegulo. La Esperanto-horloĝo estis konstruita por servi kiel reklamilo por la Kvina Universala Kongreso de Esperanto, kiu estis okazonta en Chautauqua ĉe Novjorko en 1909. La publiko reagis sufiĉe ironie, kaj la horloĝo malaperis, ĉar la kongreso en Chautauqua ne okazis. Je tiu tempo ankaŭ du aliaj rimarkindaj horloĝoj rilataj al Esperanto ekzistis; ili ambaŭ estis vekhorloĝoj de eksterordinaraj formoj.

Ulrich Lins, “Ĉu instruisto de Orwell? Eugène Adam (Lanti) kaj la senreviĝo de la maldekstraj”

Ke George Orwell rilatis kun maldekstraj esperantistoj, ni scias plej malfrue ekde la biografio de Bernard Crick (1970). Apartan atenton trovis la ligo de Nellie Limouzin, la onklino de Orwell, kun Eugène Adam, kiu sub la nomo Lanti iĝis konata kiel fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Nur iom pli ol tridek jarojn post la morto de Orwell estis publikigita eldiro (de tiam ofte citita), kiu supozigas pri frua influo de Lanti al la pensado de Orwell. Laŭ intervjuo kun Lucien Bannier, kunfondinto de SAT, Lanti kaj Orwell en 1928/29 akre disputis pri kiel juĝi Sovetan Union. Orwell tiam ankoraŭ kredis pri la revolucia potencialo de Soveta Unio, dum Lanti, ĉefe surbaze de la scio akirita per Esperanto-kontaktoj, pli kaj pli dubis pri sovetia kontribuo al la konstruado de socialismo. Kiom fidinda estas tiu ĉi fonto? Laŭ propra deklaro, Orwell ekde 1937 estis konvinkita, ke por renovigi socialismon necesas detru la “sovetian miton”. Ĉu Lanti do antaŭis lin je preskaŭ dek jaroj? Kiugrade similis la sinteno de Lanti kaj Orwell al Soveta Unio? Ĉu ili estis “antaŭtempaj kontraŭstalinistoj”? Tiujn demandojn mi deziras esplori en rilato kun la ideologiaj bataloj en la tridekaj jaroj.

Mira Sarikaya, “La sensona lingvo. La revo de Leibniz en la Neurath-a Isotype kaj aliaj simbolaj sistemoj”

Leibniz revis pri lingvo, kiu povus solvi ĉiujn problemojn, kiujn niaj naturaj lingvoj devas trakti. La ideo estis vivprojekto, kiu neniam sukcese realiĝis. Li priskribis simblan sistemon, kiu kapablas mapi niajn mensojn kaj pensojn kaj tial estus pli potenca kaj preciza ol nia natura lingvo. Ni povas trovi similecojn inter la revo de Leibniz kaj realigitaj projektoj. Ankaŭ en simbollingvoj. En 1925 Otto Neurath efektivigis simbollingvon por informi la vian loĝantaron de ĉia klereca fono, precipe la laboristan klason. La lingvo fariĝis tiel sukcesa, ke ĝi rapide fariĝis internacia kaj ricevis la nomon Isotype (Internacia Sistemo por Tipografia Bildiga Edukado / *International System of Typographic Picture Education*). Se ni sekvas la laŭtempan disvolviĝon de la ideo de Neurath, ni povas vidi, ke ĝi ankoraŭ vivas ĉie hodiaŭ – precipe en nia cifereca mondo. Ĉiu butono, ĉiu simbolo videblas kiel parto de simbollingvo. Se ni komparas ĉi tiun disvolvitan version de la lingvo de Neurath kun la ideo de Leibniz, ni povas vidi, ke la diferencoj, kiujn oni povis vidi komence, malaperas. Por krei funkciajn artefaritan lingvon kun abstraktaj simboloj ŝajnas necese, ke tiu lingvo trairu stadion de evoluo, en kiu la simboloj estas ikonecaj, kiel okazis kun la simbollingvo de Neurath. De tie lingvo povas disvolviĝi en tian formalan kaj abstraktan lingvon, kian Leibniz antaŭvidis.

Tinka Stössel, “La instruado de la franca en la publikaj Elysée-antaŭlernejoj: La tuta sistemo de la Elysée-koncepto”

Dum la instruado de fremdlingvoj fariĝis normo en lernejoj, ĝi ankoraŭ ne estas ĝenerala trajto en antaŭlerneja edukado. Nova projekto enkondukita en 2014 fare de la Urbo Munkeno en kunlaboro kun la kultura organizo Institut Français havas la celon plialtigi la nombron de

publikaj antaŭlernejoj, kiuj instruas la francan. Tiu ĉi kontribuo estas densigita versio de mia magistra laboraĵo kun la (tradukita) titolo: “Prijuĝado de la pilota projekto ‘Infankonforma instruado de la franca lingvo por infanoj kaj gepatroj en la publikaj Elysée-antaŭlernejoj’ – Studo ekzamenanta la influon de la ĝenerala kadro pri diferencoj de efektivigado en la ‘Franca Provleciono.’” Ĉar la antaŭlernejoj instruantaj la “Francan Provlecionon” estas parto de la franc-germana reto pri dulingva Elysée-antaŭlernejoj, la koncepto de la lecionoj havas pli grandan atingeblon ol nur la Urbo Munkeno. La celo de la studo estis ekzameni ĉiujn nivelojn de institucioj kaj de internacia ĝis loka publikaj politikoj por determini, kiu aspekto havas la plej grandan influon pri la variaĵoj en la “Franca Provleciono”. Ĝi esence liveras iom da travidebleco pri la interna funkciado de la Elysée-koncepto kaj prezentas ekzemplon de internacia lingvoprojekto ekde sia ideo ĝis la efektivigado.

Ida Stria, “Aŭtobiografioj kiel ilo por esplori la Esperanto-komunumon”

La Esperanto-komunumo sendube konsistas ĉefe el ne-denaskaj parolantoj. Esploroj montras, ke parolantoj de fremdlingvo kutime vidas sin kiel “malsukcesaj denaskaj parolantoj” (Cook 1999) anstataŭ multkompetentaj kaj plurlingvaj parolantoj. Tamen oni scias, ke denaskuloj ne ludas grandan rolon kiel normdonantoj en Esperanto (vidu Fiedler 2012). Indas do ekzameni, kiel Esperanto-uzantoj interpretas sian dualingvan identecon. Ĉi tiu artikolo diskutas la rolon de biografia rakontado en la esploro pri la naturo de la Esperanto-komunumo. Analizo de lingvaj aŭtobiografioj povus malkaŝi ĉu uzantoj de Esperanto poziciigas sin en la imagita komunumo kiel lernantoj de fremda lingvo aŭ prefere kiel legitimaj parolantoj de la cellingvo.

Bernhard Tuidler, “Planlingvoj kaj lingvoplanado: Raporto pri simpozio okaze de la 90-a datreveno de la malfermo de la Esperanto-Muzeo en la Aŭstria Nacia Biblioteko”

La Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko estas unu el la plej tradiciriĉaj lingvomuzeoj kaj unu el la plej gravaj siaspecaj institucioj. En 2019 la muzeo festis sian 90-jaran jubileon. Tial la 24-an kaj 25-an de oktobro 2019 la Aŭstria Nacia Biblioteko okazigis grandan sciencan simpozion. Enkadre de ok sesioj internacie konataj fakuloj prezentis kelkajn el siaj esploroj kaj publicaĵoj, kiuj ankaŭ spegulas la amplekson kaj diversecon de la muzea kolekto. La prezentadoj temis interalie pri la ŝanĝiĝo kaj diverseco de lingvomuzeoj, planlingvoj, lingvoplanado, kaj Esperanto en retrospektivo kaj nuntempo. La artikolo raportas pri la prezentadoj de la simpozio.

56-a Lingvistika Kolokvo

<http://www.lingcoll.de>

Ĉi tiu internacia konferenco, ampleksa je ĉiuj lingvosciencaj kampoj, unuafoje okazos kiel senpaga enreta evento, de la 26-a ĝis la 28-a de novembro 2020. Speciala temo: “Tradukado, plurlingveco kaj kognado”.

Modernlingva Asocio: Glasgovo (Skotlando)

<https://symposium.mla.org/glasgow/being-hospitable>

17-a ĝis 19-a de junio 2021. La unuigan temon “Gastamo: Lingvoj kaj kulturoj trans landlimoj” oni komprenu laŭ la kiel eble plej larĝaj sencoj de kaj *gastamo* kaj *lingvo* kaj kiel defian geston kontraŭ la nuntempe negastama, eĉ malamika, naturo de mondopolitiko. Oni petas referaĵojn.

3-a Internacia Konferenco pri Tradukado, Interpretado kaj Kognado

<https://eventi.unibo.it/ictic3/>

<https://pagines.uab.cat/trec/> (TREC)

https://www.researchgate.net/publication/343021355_3rd_International_Conference_on_Translation_Interpreting_Cognition_-_Forli_Italy_-_28-30_June_2021

Post la sukceso de ICTIC 1 (Mendoza, Argentino) kaj ICTIC 2 (Germersheim, Germanio), ICTIC okazigas sian trian numeron ĉe la Kampuso Forlì de la Universitato de Bolonjo, Italio, de la 28-a ĝis la 30-a de junio 2021.

En nur du okazoj, ICTIC fariĝis unu el la plej gravaj eventoj por universitatanoj, kiuj laboras ĉe la interfaco de tradukado, interpretado kaj kognado. Ĉi-jare ni intencas ankaŭ plivastigi la limojn de nia scienca komunumo kaj varti dialogon kun najbaraj esplorkampoj, por ke la kampo de Kogna Traduk- kaj Interpret-Studoj fariĝu vere interfaka.

ICTIC 3 estas organizata de la Laboratorio por Plurlingva Perita Komunikado kaj Kognado (MC2 Lab) de la Dipartimento di Interpretazione e Traduzione de la Universitato de Bolonjo kaj ĝin subtenas la reto TREC.

Peto por referaĵoj: 1-a de novembro 2020 – 31-a de januaro 2021.

Internacia Simpozio PaCor 2021

<https://www.ehu.eus/en/web/pacor2020/aurkezpena>

La esplorgrupo TRALIMA / ITZULIK GIC IT 1209-19 de la Universitato de Eŭskio (UPV / EHU) plezure organizas la 3-an Internacian Simpozion pri Paralelaj Tekstaroj, PaCor 2021. Ĉi tiu konferenco okazos je la 24-a kaj 25-a de junio 2021 ĉe Micaela Portilla Research Institute en Vitoria-Gasteiz (la Álava-Kampuso de la Universitato).

La celo de PaCor estas duparta: unue, identigi defiojn laŭ diversaj perspektivoj inkluzive kontrastan lingvosciencan kaj tradukadon, se nomi nur kelkajn, kun la intenco etendi aplikojn por solvi ilin; kaj due, estigi platformon por prezenti projektojn pri paralelaj tekstaroj, kie la hispana estas la pivotlingvo. Ni esperas, ke ĉi tiu tria evento aldonos al la scioj gajnitaj en antaŭaj numeroj, ne nur donante atendatajn respondojn sed ankaŭ starigante novajn demandojn, kiuj plibonigos tekstaran lingvosciencan ĝenerale kaj paralelajn tekstarojn speciale. Tiucele ni deziras, ke PaCor 2021 aparte atentigu paralelajn tekstarojn, kiuj inkluzivas almenaŭ unu minoritatan lingvon.

Kursoj de UNED nun ankaŭ je la nivelo B1

<https://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/427-ampliada-la-oferta-de-cursos-de-esperanto-en-el-cuid-de-la-uned>

En oktobro malfermiĝis la periodo por enskribiĝo en la kursoj proponitaj de CUID, la Centro pri Lingvoinstruado de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio (UNED). Unu el la novaĵoj de tiu ĉi akademia kurso 2020–21 estas la aldono de la nivelo B1 en la instruado de Esperanto. Ĉi-jare eblis do enskribiĝi denove en la baza kurso (per kiu oni atingas je la fino de la jaro la nivelon A2 laŭ la eŭropa referenckadro por instruado de lingvoj), kaj ankaŭ unufoje en la nivelo B1, al kiu povis aliri la homoj trapasintaj la nivelon A2 en antaŭaj okazoj kaj ankaŭ tiuj, kiuj jam havas iujn konojn de Esperanto pro antaŭa lernado.

La kursoj de Esperanto disvolviĝas kun la apogo de Hispana Esperanto-Federacio, pere de kunlabora interkonsento kun la universitato. La asocio zorgas pri la pretigado de kriterioj, ellaborado de materialo kaj selektado de la instruistoj. Pri la organizado zorgas CUID, en kies retejo oni povas legi la detalojn kaj formaligi la enskribiĝon.

RAPORTOJ

Societo pri Historio kaj Epistemologio de Lingvoscienco

<https://shesl-htl2020.sciencesconf.org/>

La Societo pri Historio kaj Epistemologio de Lingvoscienco (SHESL: *Société pour l'histoire et l'épistémologie des sciences du langage*), Parizo, kun ses aliaj partneroj organizis konferencon SHESL-HTL 2020 kun la titolo “Simpleco kaj komplekseco de lingvoj en la historio de lingvistikaj teorioj” (*Simplicité et complexité des langues dans l'histoire des théories linguistiques*) de la 23-a ĝis la 25-a de januaro 2020 en la universitato Paris-Diderot.

D-ro Sébastien Moret, membro de la organiza komitato, organizis kun du aliaj kolegoj Jacqueline Léon kaj Didier Samain sekcion pri planlingvoj, kie krom prelegoj pri Peano, IALA, Basic English kaj Globish aperis tri franclingvaj prelegoj kiuj rilatis al Esperanto:

- ◆ Sébastien Moret (Universitato de Lausanne, Svislando): “Esperanto kaj Ido en la sovetaĵ diskutoj pri la proleta simpleco”.
- ◆ Chris Gledhill (profesoro de la universitato Paris-Diderot): “Kombina komplekseco kaj kunteksta kohero: du, eĉ en planlingvo, neredukteblaj dimensioj de la frazeologia sistemo. Ekzemploj el tekstoj koncerne la kolokaĵojn verbo + objekto en Esperanto”.
- ◆ Ilona Koutny (Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz, Pollando): “Simpleco kontraŭ komplekseco en la kazo de la planlingvo Esperanto.”

Sukcesa VEKIĝo de ILEI

Mireille Grosjean, Prezidanto de ILEI

<https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/>

La Konferenco altiris 350 partoprenantojn kaj ofertis elekton de 75 eroj disponeblaj egale tra la diversaj horzonoj. Temis pri diversnivela programo, kiu inkluzivis vidbabilajn ĉambrojn (kun aŭ sen specifaj temoj), seriozan debaton, universitatan prelegon kaj dek koncertojn. Efikan platforman prizorgadon provizis la slovaka firmao E@I, kiu sukcese kreis kolege amikan kongresan etoson.

Ĉiutage ĝis la 15-a de novembro la Jutub-kanalo (ĉi-supre ligita) alŝutos plian filmon, filmeton, programeron de VEKI. Ĉar la evento daŭris 7 tagojn, kaj ĉar ĉiu tago enhavis 12 horojn da elsendado, estas ĉirkaŭ 80 eroj entute. La sama paĝo havas ankaŭ novaĵojn pri ILEI kaj filmetojn pri pedagogio kaj lingvolernado.

ILEI planas hibridan kongreson por 2021, kiu ebligos virtualan partoprenon de tiuj, por kiuj vojaĝi estos nesuperebla malhelpo. Por atingi tion ILEI bezonos du lertajn homojn por filmi kaj transdoni diskutojn kaj babiladojn tutmonde kaj certigi, ke debato povas okazi tra la

mondo. La Estraro de ILEI jam decidis, ke tiuj du teknikaj fakuloj ricevos senpagan loĝadon. Neesperantisto povus oferti siajn servojn nun, kaj tiam havus ok monatojn por lerni Esperanton.

Ĝis revido en Skotlando la 10an de julio 2021!

[Noto de la redaktoro: La eventon subtenis ESF.]

5-a Interlingvistika Simpozio en Poznano

Ilona Koutny, Ida Stria, Michael Farris

<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html>

<http://ie.amu.edu.pl/rekordowe-symposium-interlingwistyczne/> (fotoj)

La 5-a Interlingvistika Simpozio – organizata ĉiun trian jaron de la Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz (AMU) en Poznano (Pollando) – sukcese okazis je la 17-a kaj 18-a de septembro 2020, virtuale, kun ĉefa temo “Rolo de lingvoj en interkultura komunikado”. La celo estis kunvenigi esploristojn – esperantistojn kaj ne-esperantistojn – por prezenti siajn alirojn al interkultura komunikado, analizi la eblojn kaj problemojn en la tereno de lingvistiko, lingvopolitiko kaj kulturo, kaj komenci dialogon.

Post la bonvenigo fare de prof. Ilona Koutny, la gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, kaj malfermo fare de prof. Katarzyna Dziubalska-Kołodczyk, la vicrektorino de AMU, okazis preskaŭ 60 prelegoj en 3 sekcioj ambaŭtage kaj du blokoj da ĉefprelegoj, krome 3 diskutrondoj. Estis grava defio organizi tian aranĝon en virtuala formo, kunigi kolegojn el Eŭropo, Ameriko kaj Azio en la sama tempo, kaj kunmeti prelegojn en tri lingvoj – Esperanto, la angla kaj la pola – laŭ subtemoj. La simpozio estis vere internacia dank’ al la prelegantoj kaj diskutgvidantoj el 23 landoj (70% ekster Pollando; lingvo de la prelegoj: 31 esperante, 22 angle, 4 pole).

La programo estis riĉa kaj la diskutoj viglaj. La ĉefaj sekcioj (en pluraj blokoj) estis interkultura komunikado, lingvopolitiko kaj interkultura instruado. Ankaŭ la diskutrondoj traktis tiujn ĉi temojn jaŭde vespere (gvidataj de Ilona Koutny, Federico Gobbo kaj Duncan Charters), donante eblon por dialogo inter esperantistaj kaj aliaj kolegoj.

Esperantologio, unuavice esperanta lingvistiko, aperis en pluraj blokoj en elstara reprezento de la esperantistaj fakuloj (i.a. Vera Barandovská-Frank, Renato Corsetti, Nicolau Dols Salas, Sabine Fiedler, Federico Gobbo, Przemysław Grzybowski, Goro Kimura, Katalin Kováts, Sergej Kuznecov, François Lo Jacomo, Vincente Manzano Arrondo, Timothy Reagan, Klaus Schubert, Ida Stria, Humphrey Tonkin, Bengt-Arne Wickström). Ni mencias ankaŭ la specialan blokon kaj ĉefprelegon pri gestolingvoj (kun la partopreno de surda esploristino). La publiko povis demandadi tuj post la prelegoj kaj en la diskutejoj post la sesioj.

Dank' al la virtuala formo pli ol 300 aliĝintoj el la tuta mondo (el pli ol 40 landoj de 5 mondopartoj de Eŭropo ĝis Oceanio) povis sekvi la programon. La aliĝintoj povis rerigardi la prelegojn dum unu monato en la platformo; poste nur kelkaj elektitaj prelegoj aperos publike en speciala Jutub-kanalo. Estas planate aperigi monografion el elektitaj kaj prilaboritaj prelegoj post la simpozio.

Dum la fermo, post la dankvortoj de la gvidantino de la Interlingvistikaj Studoj, okazis raportoj pri la ĉefaj temoj. La tuto fermiĝis per mallonga muzika adiaŭo prezentita de la loka kantistino, Zuzanna Kornicka, kiu kutime vigligas la bankedojn dum la interlingvistikaj sesioj kaj simpozioj.

Ni dankas pro kunlaboro Katalin Kovats, gvidanto de la edukista portalo *Edukado.net*, kaj pro la bonega teknika realigo la teamon de E@I – Sonja, Dorota, Matthieu sub la gvido de Petro Balaž – kun kiuj ni estis en konstanta rilato dum la lastaj semajnoj. Same ni dankas al la fondaĵo ESF, kiu helpis la financan flankon de la teknika aranĝo.

Kontestataj lingvoj: La kaŝita plurlingvismo de Eŭropo

Redaktis: Marco Tamburelli (Universitato de Bangor), Mauro Tosco (Universitato de Torino)
Eldono antaŭvidita por februaro 2021 (John Benjamins Publishing Co.)

<https://benjamins.com/catalog/wlp.8>

<https://benjamins.com/catalog/wlp.8.15gob> (Federico Gobbo)

<https://www.jbe-platform.com/content/series/15721183> (serio)

Ĉi tiu volumo en la serio *Studies in World Language* estos la unua tute dediĉita al kontestataj lingvoj. Ĝi esploras la naturon de kontestataj lingvoj, la rolon de lingvaj ideologioj en la perceptado de tiuj lingvoj, la kontribuon de akademia interparolo al la formiĝo kaj daŭrigo de lingva kontestateco, kaj la damaĝo faritan de kontestateco al lingvokomunumoj kaj fine al lingvodiverseco.

Ĝi enhavas ĉapitron de Federico Gobbo pri “La lingva ideologio de Esperanto: De la monda lingvoproblemo ĝis ekvilibra plurlingvismo”.

De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko

<https://uea.org/gk/896a1>

Unesko eldonis sian unuan libron en Esperanto.

Antaŭ la Universala Kongreso de 2017, Unesko, kunlabore kun UEA, publikigis *Unesko-Kurieron* en Esperanto. La lanĉo de la *Kuriero* reciproke proksimigis la rilatojn inter Unesko kaj UEA, kaj interesigis esperantistojn pri Unesko kaj Uneskon pri Esperanto.

Por evoluigi la Esperanto-uzadon ĉe Unesko mem, laŭ iniciato de Trezoro Huang Yinbao, UEA lanĉis en aprilo 2018 strategian planon por disvastigi la idealojn kaj la valorojn de Unesko per Esperanto.

Aprile de 2019, Trezoro, la nuna dua vicprezidanto de UEA, raportante al Unesko, ke pli da esperantistoj, kiuj ne konas UN-lingvojn, esperas koni Uneskon per Esperanto, proponis, ke Unesko eldonu *De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko* en Esperanto.

La libro prezentas rakontojn pri tio, kiel Unesko plenumis sian mision, reflektante la profundecon, amplekson kaj efikon de Unesko-agado, por certigi klerigadon por ĉiuj, konservi kaj krei konsciiĝon pri universala kultura kaj natura heredaĵo, por protekti la paroliberecon, plibonigi ĉiujn sciencojn por ĉies bono, lukti kontraŭ rasismo kaj por dialogo, toleremo kaj socia inkludo, kaj por doni povon al knabinoj kaj virinoj en ĉiu socio.

Menciinde estas, ke Carlo Minnaja, komisiita de Esperanta PEN-Centro, zorge kaj tre atente kontrolis la tekston de la libro pli ol kvarfoje kaj donis bonegajn konsilojn.

Gvidilo al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj

Redaktis: Humphrey Tonkin, Rakoen Maertens (Mondial, Novjorko / UEA, Roterdamo)
<http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/gvidilo-17-celoj-por-dauripova-evoluigo-de-un/>

La Celoj por Daŭripova Evoluigo dum la periodo 2015–2030, elŝuteblaj kiel PDF-dosieroj.

- ◆ Antaŭparolo – Humphrey Tonkin
- ◆ Enkonduko – Rakoen Maertens
- ◆ Celo 1. *Neniu malriĉo* – Renato Corsetti
- ◆ Celo 2. *Nula malsato* – Heidi Goes
- ◆ Celo 3. *Bona sano kaj bonfarto* – Christoph Klawe
- ◆ Celo 4. *Bonkvalita edukado* – Mark Fettes
- ◆ Celo 5. *Seksa egaleco* – Manuela Ronco
- ◆ Celo 6. *Pura akvo kaj higieno* – Allan Argolo
- ◆ Celo 7. *Pagebla kaj pura energio* – Alvaro Motta
- ◆ Celo 8. *Bona laboro kaj ekonomia kresko* – Giorgio Novello
- ◆ Celo 9. *Industrio, inventemo, infrastrukturo* – Tamás Slezák
- ◆ Celo 10. *Redukti malegalecon* – Rafaela Uruña
- ◆ Celo 11. *Daŭripovaj urboj kaj komunumoj* – Eric Hamelin kaj Guillaume Armide
- ◆ Celo 12. *Respondecaj konsumo kaj produkto* – Manfred Westermayer
- ◆ Celo 13. *Klimata agado* – Orlando Raola
- ◆ Celo 14. *Subakva vivo* – Francesco Maurelli
- ◆ Celo 15. *Surtera vivo* – Said Pontes de Albuquerque
- ◆ Celo 16. *Paco, justo, fortaj institucioj* – Ulrich Brandenburg
- ◆ Celo 17. *Partnerecoj por la celoj* – Humphrey Tonkin

Vidu ankaŭ “Esperanto por lingva justeco kaj egaleco” sur paĝo 25.

Internacia Kongresa Universitato 2020

73-a sesio: 1–8 aŭgusto 2020. Senpage elŝutebla.

Redaktis: Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko, Amri Wandel (Eldonejo “Impeto”)

http://iku.trovu.com/pdf/iku_libro_2020.pdf


- ◆ IKU / AIS 1 – Grant Goodall: *Alproprigo de dua lingvo: Ĉu ebla post la infanaĝo?*
- ◆ IKU / AIS 2 – François Lo Jacomo: *La ora nombro*
- ◆ IKU 3 – Geoffrey Greatrex: *Romianoj kaj persoj en la malfrua antikvo: milito, arto kaj kulturo*

- ◆ IKU 4 – Pascal Dubourg Glatigny: *Esperanto kaj la Dua Mondmilito: postmemora aliro al transnaciaj rakontoj*
- ◆ IKU 5 – Javier Alcalde: *Geopolitiko, remalkovrita fako*
- ◆ IKU 6 – Keyhan Sayadpour Zanjani: *Genetiko kaj koro*
- ◆ IKU 7 – Carlos Spinola: *Veturado tra la interplaneda spaco*

Scienca Kafejo:

- ◆ Manuela Burghilea: *Komunikaj teknologioj en indiĝena aktivismo*
- ◆ John Huang: *La valoroj de Esperanto en ŝanĝiganta mondo*
- ◆ Anna Striganova: *Popolaj fabeloj kiel ilo por krei dialogon kaj trovi interkompreniĝon en la ŝanĝiganta mondo*
- ◆ Wallace George du Temple: *La kanada odiseado, lando bazita sur nekompletaj konkeroj*

At the Waters of Oblivion



<https://www.amazon.com/dp/1092643001>

Ĉe l'akvo de forgeso estas versa dramo origine verkita en Esperanto de la forpasinta Marjorie Boulton kaj tradukita de Pierre Ullman, kiu dum tridek jaroj ĝis la propra forpaso instruis la hispanan ĉe la Universitato de Viskonsino-Milvokio. Ĝi rakontas pri Orfeo kaj Euridico en la submondo.

Lingvoinventado en lingvosciencia pedagogio

Redaktis: Jeffrey Punske, Nathan Sanders, Amy V. Fountain (Oxford University Press)

<https://global.oup.com/academic/product/language-invention-in-linguistics-pedagogy-9780198829874>

Jen la unua volumo esploranta la uzon de lingvoinventado kaj konstruitaj lingvoj cele al pedagogio. Ĝi ekzamenas datumojn pri la efikeco de la uzo de inventitaj lingvoj por instruado en diversaj edukaj situacioj, donas ekzemplojn de taskoj kaj aliroj uzablaj en klasĉambro, kaj inkluzivas kontribuojn de lingvistoj, kiuj rekte kontribuis al la kresko de konstruitaj lingvoj en popularaj aŭdvidaĵoj.

La libro enhavas ĉapitron pri “La fason(ad)o de lingvo” de Grant Goodall, vicprezidanto de ESF, kaj pri “Ekflorantaj lingvistoj kaj kiel oni trovu ilin” de Arika Okrent, membro de la konsilantaro de ESF.

Lingvomastruma aliro al lingvaj problemoj: integri makro- kaj mikro-dimensiojn

Redaktis: Goro Christoph Kimura, Lisa Fairbrother (Universitato Sophia, Tokio)

<https://benjamins.com/catalog/wlp.7>

En lastaj jaroj oni vidis pli da intereso por ekzameni la pritrakton de lingvoproblemoj tra diversaj niveloj de socio, ekde aferoj de individuaj interagoj ĝis lingvo-politiko kaj -planado je la nacia aŭ supernacia nivelo. Inter la diversaj aliroj al ĉi tiu temo, lingvomastruma teorio (Language Management Theory, LMT) donas kadron por eksplicite kaj tutamplekse priskribi konduton rilate al lingvoproblemoj je malsamaj niveloj.

Uzante LMT kiel unuigan teorian koncepton, la ĉapitroj en ĉi tiu volumo ekzamenas la ligojn inter mikro- kaj makro-dimensioj en siaj analizoj de sortimento da lingvoproblemoj en azia kaj eŭropa kuntekstoj. Ĉi tiu laborkolekto ilustras, ke la LMT-kadro kapablas klare montri la karakterizaĵojn de diversaj dimensioj, aparte kiam oni kombinas ĝin kun koncepto pri mikro- kaj makro- kiel kontinuaĵo el interplektaj elementoj. Ĉi tiu volumo allogos homojn kun intereso pri lingvo-politiko kaj -planado same kiel interesatojn pri parolantoj el malsamaj lingvaj fonoj.

ALIAJ ELDONAĴOJ

Esperanto: La vivanta, ŝanĝanta, planlingva komunumo: Fono kaj eltiraĵoj laŭ esperantista perspektivo

Gian Pablo Antonetti

<https://medium.com/wikitongues/esperanto-the-living-changing-conlang-community-5293530874b3>

Ĉi tiu interesa profundiganta artikolo inkluzivas la vidpunkton de denaska Esperanto-parolanto Stela Besenyei-Merger.

Pandemio-temaj artikoloj en *Multilingua*

<https://www.degruyter.com/view/journals/mult/ahead-of-print/issue.xml>

Multilingua estas kolege reviziita akademia revuo dediĉita al plurlingvismo, lingvolernado, interkultura komunikado kaj tradukado kaj interpretado en ties sociaj kunteksto. *Multilingua* enfokusigas kritikajn sociolingvistikajn studojn pri lingvo kaj komunikado en tutmondiĝo, transnaciismo, migrado kaj moviĝemo tra tempo kaj spaco. Ĝi estas internacia forumo por interfaka esplorado pri lingva diverseco en la socia vivo.

Jen kelkaj interesaj artikoloj kun rilato al la kronviroza pandemio:

- ◆ Ingrid Piller, Jie Zhang, Jia Li – *Linguistic diversity in a time of crisis: Language challenges of the COVID-19 pandemic* (<https://www.degruyter.com/view/journals/mult/ahead-of-print/article-10.1515-multi-2020-0136/article-10.1515-multi-2020-0136.xml>)
- ◆ Qi Shen – *Commentary: Directions in language planning from the COVID-19 pandemic* (<https://www.degruyter.com/view/journals/mult/ahead-of-print/article-10.1515-multi-2020-0133/article-10.1515-multi-2020-0133.xml>)

Trans-kom

<http://www.trans-kom.eu/>

Trans-kom estas scienca revuo pri tradukado kaj specialista komunikado. Oni eldonas ĝin nur rete. *Trans-kom* eldonas esplor-rezultojn kaj sciencajn kontribuojn al diskutoj pri temoj ligitaj al tradukado kaj interpretado, specialista komunikado, specialista lingvaĵo, terminologio kaj rilataj kampoj.

Cahiers du Centre de linguistique et des sciences du langage

<https://wp.unil.ch/labelettres/interlinguistique-et-esperantologie/>

Ĉi tiu numero de *Cahiers du Centre de linguistique et des sciences du langage*, redaktita de Sébastien Moret (Fako pri slavaj kaj sudaziaj lingvoj kaj civilizacioj), volas prezenti sin kiel aliron al la mondo de artefaritaj lingvoj kaj la tiurilata scienco, nome interlingvistiko.

- ◆ S. Moret – *Préface*
- ◆ V. Barandovská-Frank – *De nouveaux défis pour l'interlinguistique*
- ◆ D. Blanke † – *Comment s'informer sur la littérature spécialisée en interlinguistique et en espérantologie*
- ◆ P. Valore – *Ce qui ne va pas avec la langue cosmique LINCOS*
- ◆ M. Duc Goninaz † – *Le classement des lexèmes en espéranto: histoire et situation actuelle*
- ◆ S. Fiedler – *La phraséologie de l'espéranto comme preuve de l'expressivité et du caractère vivant d'une langue planifiée*
- ◆ I. Koutny – *Caractérisation typologique de l'espéranto comme langue naturelle*
- ◆ M. Maradan – *Des réflexions interlinguistiques à une discipline scientifique: élaboration et influence du Dictionnaire encyclopédique espéranto-allemand (1923) d'Eugen Wüster*
- ◆ E. Simonato – *La question des emprunts dans le travail terminologique soviétique des années 1920–1930*
- ◆ A. Duličenko – *Entre africanistique et cosmoglottique: les conceptions de N.V. Jušmanov sur la langue universelle*
- ◆ I. Ivanova – *La question des langues artificielles dans les travaux de Baudouin de Courtenay*
- ◆ S. Kuznecov – *La Société "Kosmoglot(t)" pour la langue internationale (1916–1928)*
- ◆ S. Moret – *Un nouveau document en langue etem*

Oficiala rekono de minoritataj lingvoj kaj lingva justeco: indikilo fondita sur bonfart-ekonomiko

Bengt-Arne Wickström and Michele Gazzola (Universitato de Ulstero)

https://www.ulster.ac.uk/__data/assets/pdf_file/0004/644665/205.pdf

Ni konstruas indikilon por speguli la gradon de lingva justeco en la rekono de oficiala statuso por minoritataj lingvoj en difinitaj jurisdikcioj. La indikilo estas fondita sur la ideoj de konstitucia ekonomiko kaj ni trovas specifan formulon, kiam lingvorilataj varoj estas pure kolektivaj varoj (nerivaleco en konsumado). La indikilo dependas de la krita valoro de la grandeco de la minoritato kaj la suma grandeco de la popolo en la jurisdikcio. La indikilo ilustrigas helpe de la priminoritata politiko en Slovakio kaj Rumanio.

Esperanto por lingva justeco kaj egaleco

Humphrey Tonkin and Chuck Mays

<https://globalsolutions.org/esperanto-for-linguistic-justice-and-equality>

Bonvolu helpi per respondo al la enketo *UN75 – 2020 kaj Poste* ĉe <https://un75.online>. Ĝi estas disponebla en multaj lingvoj, kaj je la unua fojo la UN inkluzivis la eblon uzi Esperanton. Kial? Ĉar la komunumo kaj individuoj de Esperantujo havas longan historion de subteno al la celoj de la UN kaj de kunlaboro kun organizoj kiel Civitanoj por Tutmondaj Solvoj.

Vidu ankaŭ la libron “Gvidilo al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj” sur paĝo 20.

Efemereco kaj Tunela Esperanto: studo pri plurlingvismo, laboro kaj rilatevoluigo en tunelbora projekto

Kamilla Kraft (University of Copenhagen)

<https://doi.org/10.1515/ijsl-2020-2098>

Ĉi tiu referaĵo esploras plurlingvismon kiel lingvajn kaj komunikajn interŝanĝojn kaj praktikojn en projekto por konstrui metroan tunelon en Kopenhago. La projekton karakterizas efemereco: senĉesaj tempospacaj ŝanĝiĝoj de kaj labororganizo kaj personaraj rilatoj. En ĉi tiu situacio, la forte internacia kaj plurlingva konsisto de la dungitoj enfokusigas lingvon kaj komunikadon.

Eldonita rete en *International Journal of the Sociology of Language*.

Language Problems and Language Planning

Dr Michele Gazzola (Universitato de Ulstero)

<https://benjamins.com/catalog/lplp>

Mi estas redaktoro de la akademia revuo *Language Problems and Language Planning*. LPLP estas interfaka kaj plurlingva scienca revuo, kiu aperas trifoje jare. Ĝi ekzistas de 1977, kaj ĝi estas la plej maljuna internacia faka revuo pri lingvo-politiko kaj -planado. LPLP aperas el la fama eldonejo John Benjamins.

Mi invitas vin sendi viajn sciencajn artikolojn al LPLP. Bonvolu sekvi la gvidliniojn ĉe la ĉi-supra adreso, sub la titolo “Submission”. Se via artikolo temas pri Esperanto, bonvolu sendu ĝin al f.gobbo@uva.nl.

Studoj pri Mondaj Lingvaj Problemoj

<https://benjamins.com/catalog/wlp>

Studies in World Language Problems (WLP) koncentriĝas pri politikaj, sociologiaj kaj ekonomikaj aspektoj de lingvo kaj lingvouzado. Ĝi aparte okupiĝas pri rilatoj inter kaj en lingvaj komunumoj, precipe en internaciaj situacioj, kaj pri la adapto, manipulado kaj normigon de lingvo por internacia uzado. Ĝi celas eldoni monografiojn kaj redaktitajn volumojn pri lingvopolitiko, lingvomastrumado kaj lingvouzado en internaciaj organizoj, plurnaciaj entreprenoj, ktp, kaj teoriajn studojn pri monda komunikado, lingva interago kaj lingva konflikto.

Pri la aspekto de Esperanto laŭ la vidpunkto de iuj lingvistoj: diversaj neveraj asertoj pri Esperanto kaj ĝia lingvokomunumo

Louis F. von Wunsch-Rolshoven

http://www.esperantoland.org/dosieroj/2019-05-12__Image_Esperanto_linguists__Wunsch-Rolshoven.pdf

La misfamigo de Esperanto kaj la erara glorigo de la angla

Louis F. von Wunsch-Rolshoven

<https://www.youtube.com/watch?v=nKb-vRBNEmw>

Filmeto de reta prelego ĉe la Antverpena klubo *La Verda Stelo*, je la 26-a de julio 2020.

La slavaj fontoj de Esperanto

<https://oaj.fupress.net/index.php/ss/article/view/2269/2269>

https://doi.org/10.13128/Studi_Slavis-10541

Itallingva artikolo pri la slava influo al la prononco, alfabeto, vortostoko, morfologio kaj sintakso de Esperanto.

Resumo de italaj disertacioj pri Esperanto

<https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2020/07/Riassunti-tesi-italiane-majo-2020.pdf>

Kompilita de Alessandra Madella. Preskaŭ ĉiuj disertacioj en la listo troveblas ĉe la bitoteko de la Itala Federacio kaj ĉe la Biblioteko de Massa.

Esperanto kaj sociaj sciencoj

Internacia Pedagogia Revuo 2020/01, p. 7–10


Kutime oni rilatigas la universitatan instruon de/pri Esperanto al (inter)lingvistiko. Ĉi tiu teksto klarigas tri spertojn pri tute malsamaj fakoj, nome sociaj sciencoj. Espereble tiu mallonga rakonto inSPIROS aliajn instruistojn kaj profesorojn kuraĝi paroli pri la internacia lingvo en siaj fakaj kursoj, kaj kiel ekzemplo de unu el la pritraktataj temoj, kaj kiel esploroobjekto.

Ludwig Zamenhof, la inventinto de Esperanto

Historia National Geographic 195, p. 12–15, marto 2020

Temas pri hispanlingva teksto pri la unuaj jaroj de Esperanto kaj pri la vivo de d-ro Zamenhof. Ĝi aperis en prestiĝa kaj tre disvastigita revuo pri vulgarigo de historio, kiu aĉetebblas en gazetbudoj. La artikolo inkluzivas plurajn valorajn bildojn, kiuj utilas por kompletigi la tekston.

Maro estas gutaro. Historio de la Esperanto-movado en Katalunio



Zaprunder 52, majo-setembro 2020

<http://storieinmovimento.org/2020/09/03/cinquantaduesimo-numero/>

Jen faka artikolo, en la itala, pri la historio de la kataluna Esperanto-movado kaj ĝiaj du ĉefaj dimensioj: nacia kaj socia, t.e. ĝiaj rilatoj kun tiuj, kiuj defendis la katalunan kulturon, kaj tiuj, kiuj partoprenis la revolucion (klas-)batalon. Ĝi publikiĝis ene de speciala numero pri lingvo kaj konflikto de *Zaprunder*, ĉefa prihistoria revuo en Italio pri sociaj movadoj kaj sociaj konfliktoj.

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kaj Angela Tellier.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al Angela Tellier ĉe ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 31 decembro 2020. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <http://esfacademic.org>, <http://esfconnected.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Moreira Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>